



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

N-ro 25/77 - 24 jun 1977

Aperas ĉiusemajne

VI ESTAS EN  
**BONA ESPERO**  
KIE ONI LABORAS SUB  
LA SIGNO DE ESPERANTO

### Novaĵoj el Bona Espero.

Brasilia (pp) - Pilo-Press jam kelkfoje raportis pri "Bona Espero", la Esperanto-komunumo en la brazila savano norde de la brazila ĉefurbo Brasilia.

La 18-an de junio atingis nin letero de ges-roj Gr-attapaglia, kiu informis pri kelkaj novaĵoj.

En la letero oni povas legi: "Inter la lastaj novaĵoj elstariĝas artikolo pri Bona Espero aperinta en la grand-formata revuo "Manchete" (eldon-nombro 350 000), eldonita en Rio de Janeiro sub la dato 18-a de junio 1977.

Temas pri du kompletaj paĝoj de koloraj bildoj pri Bona Espero kaj preskaŭ unu paĝo da teksto en kiu Esperanto kaj entute nia socia laboro ĉi tie estas tre oportune prezentitaj."

Al la letero estas aldonita fotokopio de la ilustrita artikolo. Jen la tradukoj de kelkaj surskriboj: BONA ESPERO - ekzemplo de paĉo kaj amo; Kelkaj membroj de la komunumo ŝanĝis komfortan vivon en Eŭropo kun altruisma projekto en la savano; En la internlando de Goias, komunumo sin dediĉas al la edukado de infanoj kaj al prilaboro de la tero - parolante Esperanton.

"Tiu interesiĝo pri ni ne estas izolita ekzemplo", plue skribas s-ro G. Grattapaglia, "ĉar antaŭ du semajnoj trupo de televida kompanio REDE-GLOBO (unu el la plej konataj en Brazilo) restadis kelkajn tagojn en Bona Espero por filmi kaj intervjui."

La televida raporto estis elradiita dimanĉe vespere, la 12-an de junio. S-ino Ursula Grattapaglia skribas pri tio:

"Mi alvenis ĉi-matene je la dua horo en Brasilia por vidi la televidelsendon pri nia institucio kaj ĵus tio estis farita kaj grandioza propagandefiko estas senduba...."

En aldono s-ino Grattapaglia daŭrigas: "Lundon tagmeze! La efiko estas vere sukcesa! En la centro de la urbo librovendejo proprainiciate montras grandan afiŝon invitante al aĉeto de Esperanto-libroj! Ĉe la Esperanto-centro de Brasilia la telefono estas daŭre okupata.

Ĉi-matene venis al mi "Jornal de Brasilia" por plia intervjuo kun foto (loka gazeto)."

Fine de sia letero de la 11-a de junio s-ro Grattapaglia konstatas:

"Kiel vi vidas, do, el nia "avanejo" en la savano mi ne restas man-en-mane kaj ni klopodas prepari la terenon por la Universala Kongreso en Brazilo. Pri ĝi ni ne havas konkretajn informojn, ĉar, pro diversaj kialoj, ne estis eble sendi al UEA la oficialan inviton por la jaro 1980-a, sed ni fidis je 1981-a."

Pri Pilo-Press s-ro Grattapaglia skribas: "...ni alte taksas vian helpon pro la sendado de Pilo-Press, kiu estas la plej rapida kunligilo kun la esperantista mondo..."

Pilo-Press dankas pro la rekonaj vortoj kaj sendas al Bona Espero bondezirojn kaj korajn salutojn!

## Ĉu terorismo kontraŭ Esperanto?

Peine (pp) - Pri la unua internacia lerneja semajno de ILEI en la dua regiono de Eŭropo, kiu okazis de la 14-a ĝis la 22-a de majo 1977 en la junulargastejo Sanit Gerard en Belgio, ni jam mallonge raportis en Pilo-Press n-ro 23/77, p. 3.

Intertempe ni ricevis ampleksan raporton de la pedagogia gvidanto de tiu lerneja semajno, s-ro Helmut Sonnabend ( In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine). La interesan raporton en formo de taglibraj notoj ni publikigos en la 3-a numero de Eŭropa Esperanto-Revuo.

Ĉi-tie ni publikigas kelkajn citaĵojn:

52 geknaboj kune kun ges-roj Peek, Ruff kaj Sonnabend venis el Germanio, 18 geknaboj el Francujo kaj ges-roj Magadore kaj ges-roj Benistant, el Nederlando 48 geknaboj kune kun la geinstruistoj Hagedorn, Mensen kaj Van Tol, akompanataj de pluraj helpemaj gepatroj, 14 gejunuloj alvenis el Zagreb kun fraŭlino Hudecek kaj la gastigantoj de Saint Gerard lernejo, la Esperanto-infanoj kun sia lernejestro, s-ro Sondervorst, samtempe ankaŭ la lernejestro de la Internacia Lernejo.

La pedagogia gvidanto prisaŭlutas preskaŭ 170 personojn. Mi alparolis ilin: "Eŭropaj Infanoj"! Tiuj ĉi vortoj validas ĝis la fino de la internacia semajno....

Nerve kaj vikle ellitiĝas la junaj eŭropanoj. La unua tago de la Internacia Lernejo komenciĝas. La gelernantoj kolektiĝas en siaj klasoj. S-ro Benistant gvidas la unuan klason, s-ro Magadore la duan, s-ino Mensen la trian, s-ro v. Tol la kvaran, s-ro Peek la kvinan, s-ro Hagedorn la sesan, s-ino Ruff la sepan kaj fraŭlino Hudecek la okan.... Impresforte estis nun la lernlaboro inter instruisto kaj gelernantoj. Interesa konstato estas, ke la infanoj efektive lernas pere de la I L. Ĉu en komuna lernado de Esperanto, ĉu en aliaj fakoj, la infanoj atente sekvis la instruadon kaj komprenis!.....

Senpere dum la tagmanĝa paŭzo estas granda ekscitiĝo. Preskaŭ ĉiuj infanoj estas kolektitaj de pluraj gekolegoj en la granda koridoro. Ili ne plu estas en la ĉambroj. Iu frenezulo estis pafinta kvin kuglojn al la junulargastejo. Unu trafis nederlandan patrinon kaj vundis la nukon. Dank' al dio, ne tiel grave, tamen la sinjorino devis kelkajn tagojn en la lokan hospitalon.

**Kaptita jam estis la pafinto saman posttagmezon. Lia senkulpigo: Mi malamas la eklezion!**

Trankviligi la infanojn kaj kvietigi la tutan instruon atmosferon daŭris sufiĉe longe. Moderna tempo: Ĉu terorismo nun de la komenco apartenas al la Internacia Lernejo?.....

Intertempe la klasoj jam laboras konsiderante la prezentadon kaj sabbatan ekspozicion. Ĝi estos desegna kaj skriba: ni eŭropaj infanoj, niaj domoj, kion ni volonte manĝas, kion ni povas aĉeti per..., la najbaro apud mi, nia ekskurso al Bruselo ktp.....

Mi sidas dum la infana prezentado apud la ĝenerala inspektoro, s-ro L. Andreanne, kiu bonege parolas la germanan lingvon. Tial mi povas informi lin pri la internacia eksperimento. Post la prezentado ni rigardas la ekspozicion. La ĝenerala inspektoro tre interese rigardas la verkojn de la infanoj kaj ne nur gentile demandas multe. Li mem sen instruado tradukas multajn vortojn. Do, Esperanto ne estas problemo por tiuj, kiuj vere volas lerni ĝin.....la ĝenerala inspektoro de Belgio, s-ro Andreanne, samopinias kun mi: Esperanto estas la taŭga lingvo kiel baza por tiuj, kiuj volas lerni aliajn fremdajn lingvojn.....

Unika eksperimento kontentige sukcesis!

## Tagoj de Bydgoszcz

Bydgoszcz (pp) - Okaze de Tagoj de Bydgoszcz Fako pri Kulturo kaj Arto de la Urba Oficejo en Bydgoszcz, Filio de Pola Esperanto-Asocio, Buroo de Junulara Turismo "JUVENTUR", Turisma Centro de Pola Esperanto-Asocio kaj Klubo "Esperanto" en Bydgoszcz aranĝis Internacian Esperanto-Renkontigon "BYDGOSZCZ-77" de la 3-a ĝis la 5-a de junio 1977. Partoprenis pli ol 500 esperantistoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, F R Germanio, GDR, Hungario, Meksikio kaj Pollando.

Ĉefa temo de la Renkontiĝo estis folkloro, kiun prezentis folklorensembloj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando. Kadre de la Renkontiĝo okazis seminario-konkurso "Rolo de la kultura aktivado por la disvolvo de Esperanto". La unuan premion - senpagan partoprenon en Internacia Aviadilbuslinio "Esperanto" Pollando-Bulgario - gajnis W. Zelasny el Rzezów. Pliajn premiojn gajnis i.a. I. Pawlowska, Bydgoszcz, kaj s-ino Helly Sauerbrey el Berlino, GDR. La ĵurio konsistis el mag. R. Szwedowski, red. R. Dobrzyński, d-ro M. Dobrzyński, d-ro T. Tyblewski kaj J. P. Bieliński.

Samtempe en Bydgoszcz okazis renkontiĝo kaj interparoloj de 50 reprezentantoj de Ĉefaj Estraroj de Hungara kaj Pola Esperanto-Asocioj. Rezulte de la interparoloj estis starigita kunlaboro inter preskaŭ ĉiuj Teritoriaj Komitatoj de HEA kaj Filioj de PEA, ekz. Budapest-Bydgoszcz, Pecs-Gdańsk, Szeged-Lódź, Miskolc-Katowice.

Okazis ankaŭ renkontiĝo de fervojistoj-esperantistoj, kiun partoprenis la prezidanto de IFEF, Joachim Giessner, F R Germanio.

Internacian Vesperon de Amikeco riĉigis senhalta ludado de la ensemblo "Skaltro". Dum la vizitado de Bydgoszcz kun Esperanto-ĉiĉerono la partoprenantoj konatiĝis kun agado de Pola Skolta Asocio vizitante Skoltan Esperanto-Tendaron ĉe la Popollernejo n-ro 22 en Bydgoszcz. Hungara Pupteatro el Pecs, kelkaj artistoj kaj diaporomo pri Bydgoszcz konsistigis Varian Esperanto-Vesperon. Ĉe la Monumento de Batalo kaj Martireco omaĝe al la Herooj estis metita florkrono.

La tre riĉan programon de la aranĝo preparis 50-persona Organiza Komitato gvidata de mag. Andrzej Grzebowski.

En la materialoj de la Renkontiĝo oni trovas i.a. novan turisman Esperanto-informilon pri Bydgoszcz, ornitologian vortaron, turisman vortareton kaj kelkajn insignojn. Okaze de la Renkontiĝo, kiu estis tre sukcesa kaj alte pritaksita de la urbaj aŭtoritatoj, estis malfermita pligrandigita kaj bele ekipita Klubo "Esperanto" en Bydgoszcz en folkloro stilo.

Oni jam nun decidis okazigi Internacian Esperanto-Renkontigon en 1978 sub la nomo "BYDGOSZCZ-78".

\*\*\*\*\*

## En propra afero

Ankaŭ en Nürnberg sukcese funkcias Esperanto-Centro, cetere jam dum 14 jaroj. Ĉi tie en Nürnberg fakte naskiĝis la esprimo "Esperanto-Centro" en la senco, kiel ĝin nun uzas ankaŭ aliaj centroj.

En la Esperanto-Centro Nürnberg eldoniĝas Pilo-Press, Esperanto-Nachrichten-Dienst (END), Eŭropa Esperanto-Revuo, funkcias libroservo, okazas seninterrompa diversspeca kaj diversnivela informado al ne-esperantistoj kaj esperantistoj.

Esperanto-Centro Nürnberg uzas kaj disvastigas Esperanton, kiel ĝin kreis d-ro Zamenhof, kiel ĝi evoluis laŭ konstanta tradicio kaj kiel ĝi hodiaŭ estas. Esperanto-Centro Nürnberg ne opinias, ke la vorto "Esperanto" estas malhelpaĵo por la plua disvastigo de Esperanto.

## Feriaj salutoj

Elkorajn somerajn salutojn al la redaktoro kaj legantaro de Pilo-Press sendas al la nunjara feriad-loko Andrzej Pettyn

En Ostrów-Mazowiecka (400 km nord-oriente de Varsovio) bone aŭdeblas la elsendoj de Radio Roma, Vieno, Bern kaj Zagreb; ankaŭ Pekino kaj Vatikano same relative klaraj estas!

\*\*\*\*\*

Feriante mi sendas al vi salutojn kaj ĵus verkitan tradukon de nia proverba moto:

Kiel sunhorloĝo faru

Gajajn horojn nur komparu!

Korajn feriosalutojn

Bernhard Eichkorn, pastro

Noto: Pastro Bernhard Eichkorn loĝas en D-7731 Unterkirnach kaj ferias nuntempe en Svislando!

\*\*\*\*\*

## Gratuloj

Altestimata sinjoro Pickel, kara samideano!

Obeante ĝojan korimpulson, ni ankaŭ s k r i b e esprimas plej sinceran gratulon je la bela distingo, flanke de la Germana Ligo Esperantista publike dediĉita al vi, kara samideano, al kiu ankaŭ nia redakcio ŝuldas multan dankon pro via tiom aktive favora al ni - idealisme eĉ varbanta por ni - sinteno same kiel pro la regule sendataj al ni novaĵoj, ĉiam - jes ĉ i a m ! - plej trafe elektitaj de vi el ĉiuj sferoj de la vastampleksa, fojfoje eĉ komplika, Esperanta vivo.

Nome de la Esperanto-Redakcio de  
Radio Wien

via sindona Dr. Karl Beckmann

\*\*\*\*\*

## Radio Zagreb pri Pilo-Press

"Pilo-Press, la internacia informo-servo el Nürnberg, Germanio, sendis al ni ĉiujn siajn bultenojn el marto kaj aprilo, la majaj ie atendas kaj verŝajne atingos nin. PILO-PRESS en sia kutima priradia raporto iom ri-proĉe rimarkas, ke ĝi dum jaroj sendas al ni konstante ĉiujn bultenojn. Tion ni neniam neis. Nia redakta komitato ne havas sekretarion kaj dependas de la instanca, tre granda, administra aparato, en kies reto povas io perdiĝi. PILO-PRESS, kiel ĉiam aperigis amason da novaĵoj, informoj pri okazintaj kaj okazontaj esperantistaj aranĝoj kaj komentarioj pri radio-elsendoj. Sed ĉi-foje sinjoro Pickel surprizis ĉiujn radio-aktivistojn per sendo de la bulteno, laŭ aspekto sama kiel Pilo-Press, sed ĝia titolo estas "Esperanto en Radio" kun la subtitolo "radio-bulteno Numero 1 el 1977". Aperis pluraj artikoloj prenitaj el Esperantaj radio-programoj. Objektivecon respegulas artikoloj kaj de la Pola Radio kaj de la Viena. Ĉe la fino la redaktoro direktas 2 enketo-demandojn al ĉiu radio-aktivisto. Apero de tiu bulteno dediĉita nur al radio-elsendoj certe estas la plej granda kuraĝigo donita de iu gazeto al Esperantlingvaj elsendoj." Elsendo de 27.5.77

PILO-PRESS, semajna informservo, redaktoro kaj eldonanto: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg, F R Germanio. Jara abonkotizo 30,-- GM. Pagebla al Ludwig Pickel, D-8500 Nürnberg, PSchKonto Nürnberg 819-56-851.